# *UN memorigas viktimojn de la etno tutsi en Ruando.*



Nov-Jorko, 12 apr (RHK) La ?enerala Asembleo de UN memorigas hodia? la viktimojn de la genocido de 1994 en Ruando, kiu provokis pli ol 800 mil mortintojn, plejmulto el la etno tutsi.

La prezidento de Ruando, Paul Kagame, estas unu el la invititoj al la speciala sesio, kiun partoprenas  anka? la ?enerala sekretario de UN, António Guterres. Oni a?dos atestojn de transvivintoj de tia masakro.

Por memorigi la mortintojn de tiuj mallumaj ?apitroj de la historio de la homaro dum la lastaj jaroj, la ?enerala Asembleo deklaris la 7-an de aprilo kiel la Internacia Tago de Cerbumado pri Genocido kontra? la etno tutsi, la? raportis la informa agentejo  Prensa Latina.

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/188238-un-memorigas-viktimojn-de-la-etno-tutsi-en-ruando](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/188238-un-memorigas-viktimojn-de-la-etno-tutsi-en-ruando)

**Radio Habana Cuba**